# INFORM ★ KAJERO


| | |
|---|---|
| Kial vi lernis Esperanton? | ... 2 |
| Statuto de S.A.T. | ... 3 |
| Komentoj pri la Statuto | ... 4 |
| La starpunktoj de SAT kaj de SAT-Junulfako laù ties rezolucioj | ... 5 |
| SAT-periodaĵoj - SAT-eldonoj | ... 7 |
| SAT-servoj | ... 8 |
| Esti membro de SAT... | ... 9 |
| Laboristaj Esperanto-Asocioj | ...10 |
| LEA-Komitato | ...10 |
| "La Juna Penso" | ...11 |
| Broŝurservo de LJP | ...12 |
| Junulfako de SAT | ...14 |
| SAT-frakcioj kaj afingrupoj | ...15 |
| - Abundanoj, Liberpensuloj | ...15 |
| - Liberecanoj, Mondcivitanoj | ...16 |
| - Pacistoj, Naturamikoj | ...17 |
| - Sennaciistoj | ...17 |
| Manifesto de Sennaciistoj | ...18 |


--==o==--


Suplemento

de

La Juna Penso - F 47340 Laroque Timbaut

1974

# Kial vi lernis ESPERANTON?

Certe ne nur por interŝanĝi poŝtkartojn, por surporti plian insignon aŭ por originale pasigi tempon!

Sed vi lernis Esperanton por

- havi senperajn rilatojn kun samideanoj el la tuta mondo;
- ekkoni opiniojn, pensojn kaj aspirojn de alilandaj amikoj;
- ekkoni kulturon kaj vivon de aliaj regionoj;
- antaŭenpuŝi ĉiujn fortojn, kiuj luktas por paco, interkompreno kaj solidarsento inter ĉiuj homoj;
- helpi starigi demokration kaj pacan kunvivadon en la tuta mondo...

Se vi lernis Esperanton tiucele, vi nepre bezonas informojn pri ....

"Sennacieca Asocio Tutmonda"

"SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA"

67, Av. Gambetta
75020 PARIS
Francio

## Statuto de SAT

1. Sub la nomo "Sennacieca Asocio Tutmonda" (SAT) estas fondita asocio, kiu celas:
   a. utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto por la klasaj celoj de la Laboristaro tutmonda;
   b. kiel eble plej bone kaj digne plifaciligi la interrilatojn de la membroj, tiel kreskigante ĉe ili fortikan senton de Homeca solidaro;
   c. lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiele, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj plej perfektaj el la tiel nomataj internaciistoj;
   ĉ. servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj, kies celo estas analoga al tiu de SAT;
   d. peri kaj ĉiel eble helpi al kreado de literaturo (tradukoj kaj originaloj) spegulanta la idealon de nia Asocio.

SAT, ne estante partipolitika, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj; per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe siaj membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj.

Unuvorte, SAT celas per konstanta uzado de racie elpensita lingvo kaj ĝia mondskala aplikado, helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias plej rekta, aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo.

26....La membroj firme konvinkiĝu kaj neniam forgesu, ke ilia aparteno al SAT donas al ili ne nur rajtojn, sed ankaŭ devojn: la Asocio ja havas praktikan kaj idealan celon, ĉies devo estu do memedukiĝi por fariĝi ĉiurilate inda batalanto laboranta efike al starigo kaj prosperigo de senklaseca kaj senekspluateca socio.

## Komentoj pri la Statuto

Tiu statuto estis akceptita ĉe la fondo en 1921 kaj kompletigita en la jaro 1928 (nome la 2a kaj 3a alineoj). La socia evoluo dum pli ol 50 jaroj de la asocia vivo kondukis al tio, ke iagrade la unuaj difinoj pri rolo kaj taskoj de SAT meritas modifon. La konsisto de la medio, al kiu sin turnas la fondintoj en tiu paragrafo de la statuto, havas en la nuno alian aspekton, alian amplekson. Restas tamen integre la baza tasko: (en paragrafo a.) utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda, - se oni inkludas en "laboristaro" ĉiujn salajrulojn de la modernaj ŝtatoj kaj preskaŭ 100-procente la loĝantaron de subevoluintaj regionoj.

La punkto b. - kreskigo de homa solidarsento - restas daŭre aktuala, povante trafi dank'al esperanto pli realan stadion.

La punkto c. - kiun larĝe komentas la poste aldonitaj 2a kaj 3a alineoj - prezentas esencan rolon de SAT (eduka laboro). Ĝi spegulas klare kaj precize la idealon de SAT (sennaciigo de la mensoj). La gazetoj eldonataj de SAT estas unu ĉefa rimedo de tiu edukado; kaj tial la membreco entenas ricevon de la monata organo "Sennaciulo". Ankaŭ la ĉiujaraj tutmondaj kongresoj servas tiun saman celon.

La punkto ĉ. - interrilatigo kun la ekstero - la realo en tiu duonjarcento ĵus pasinta ne pravigis la esperojn pri konkretaj rezultoj el tiuj dezirindaj kontaktoj.

La punkto d. - La libro-eldonado malrapidiĝis en la nuna tempo. Sed estas haveblaj multaj instruaj kaj beletraj verkoj, kiujn publikigis la asocio kaj aperis la unika Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto ĉe SAT. (°)

Bonvolu tre atente studi la 2an kaj 3an alineojn pri la filozofio de SAT. Tie ĉiu vorto havas sian pezon. Hodiaŭ la difino "klasbatalaj lab. partioj ktp" povus ŝoki iujn, ĉar la terminoj ricevis alian signifon en 1974 ol en 1920. Oni dirus hodiaŭ "la diversaj lab. partioj kaj sindikatmovadoj akceptantaj la principojn de demokratio..." ?

La strukturo propra de SAT montras reale, kio povas esti sennacieca socio.

------

(°) Efektive, SAT nun ree entreprenis liveri al Esperantio valorajn literaturaĵojn kaj la kompletan verkaron de la fondinto, E. Lanti, en pluraj volumoj...(Kompil. noto)

La starpunktoj de SAT
kaj de SAT-Junulfako
laŭ ties rezolucioj
(ekstraktoj)

# rezolucioj

- ĝojas pri la kontentiga disvendado de "Plena Ilustrita Vortaro", eldonita de Sennacieca Asocio Tutmonda;
- kondamnas la profitsistemojn privatan kaj ŝtatan, sur kiuj baziĝas la nuna konsum- kaj produkt-socio, kiuj iom post iom invadas la tutan mondon kaj kondukas al la eluzo de laboristaj fortoj kaj naturriĉaĵoj;
- rekomendas al la movadoj batalantaj por socia justeco kaj homa digno, ĉefe en la malriĉaj kaj ekspluatataj regionoj de nia planedo (la t.n. tria mondo), studi kaj apliki revoluciajn, sed ne perfortajn rimedojn por sia lukto;
- konstatas, ke en tiuj landoj oni daŭre uzas la lingvojn postlasitajn de la koloniistoj, kaj rekomendas al la tieaj emancipaj movadoj ekuzi esperanton en siaj rilatoj;
- bedaŭras, ke unuflanke la homaro fulme evoluas je scienca kaj teknika terenoj, sen aliflanka evoluo de moralo kaj vivnivelo;
- abomenas la ŝajn-sciencajn evoluojn, kiuj ne devenas de nura scienca intereso, sed de militistaj kaj naciistaj prestiĝaj konsideroj;
- atentigas pri la danĝero de ĉiam pli kaj pli venenitaj aero, akvo kaj tero pro ĉiuspecaj kaŭzoj, kaj simpatias al asocioj, kies celo estas protekti la naturon;
- aparte esprimas sian simpatian subtenon al la movadoj, kiuj uzas aktivan neperforton (ekzemple "Batalo por la Homo"), praktikas ĉiunivelan memmastrumadon kaj sendiskriminacie helpas al viktimoj de diktaturoj (ekzemple "Amnestio Internacia");
- kondamnas do la reformisman strebadon "plibonigi" la nunan ekonomian sistemon bazitan sur monprofito, eks-

pluatado de homo far homo kaj fuŝado de la naturaj vivnecesaĵoj;

- konsideras kun granda atento la nunajn tutmondajn provojn de la junularo radikale kontesti la kadukajn aspektojn de la establita kaj perforte plutenata sociordo (militservo, fuŝedukado, seksaj tabuoj ktp.) kaj organizi en komunumoj liberan kaj pli naturan vivon;
- alvokas ĉiujn progresemajn esperantistojn - junajn kaj ne - ke ili intensigu sian informlaboron por kaj per esperanto interne de tiuj movadoj, kiuj celas la starigon de justa, sennacieca sociordo en la tuta mondo...

(la kvar lastaj alineoj fontas el SAT-Junulfako)

.........................................................

El la gvidrezolucio de SAT, adoptita en Toronto(Kanado) okaze de la 46a Kongreso (aŭgusto 1973) :

.........................................................

- konstatas kun plezuro, ke la itala socialista partio proponis la uzon de Esperanto por la rilatoj kun la aliaj socialistaj partioj; instigas la SAT-anojn, membroj de socialistaj partioj, fari la necesajn agojn pere de sia partio, subteni tiun iniciaton;
- apogas la klopodojn de la Mondcivitanoj por starigo de tutmondaj instancoj kaj denove proponas al ili la uzon de Esperanto tiucele;
- kondamnas ĉiujn atombombajn proveksplodojn kaj energie protestas kontraŭ tiu poluado;
- kontente konstatas, ke SAT daŭrigas la eldonadon de laboristtendencaj libroj;
- esperas, ke la okazigo de SAT-kongreso sur Amerika kontinento donos novan stimulon al la Organizo kaj antaŭenpuŝos la supertendencajn kaj progresemajn ideojn en SAT.

★

## SAT-periodaĵoj

"Sennaciulo" : ĉiumonata, ilustrita organo de SAT, kiun ricevas ĉiu membro. Multaj artikoloj sociaj, politikaj, kulturaj. "Ĉies opinioj" "Junulara angulo" ktp, kaj rubrikoj de la diversaj SAT-frakcioj.

"Sennacieca Revuo" : ĉiujara, tre ampleksa kajero kun kontribuoj originalaj kaj ilustritaj el kunlaborantoj ĉiukontinentaj. Socipolitiko, scienco kaj literaturo.

"La Juna Penso" : dumonata gazeto, prizorgata de junaj SAT-anoj, verkata de la abonantaro mem. Utilas krome kiel komuna organo de pluraj SAT-fakoj, frakcioj kaj afingrupoj. Perantoj en multaj landoj. Eldonas suplemente ampleksan broŝurserion.

"Kalejdoskopo" : la Geknaba Bulteno de SAT. Aperas ĉiun trian monaton. Ilustrita.

"Jarlibro de SAT" : ĉiun duan jaron. Adresaro de ĉiuj membroj kaj instancoj. Teksto de la asocia statuto kaj diversaj regularoj. Libroservo. Fine, alfabeta listo de la SAT-membroj.

## SAT-eldonoj (ekstrakto)

Faŭsto I (Goethe/Bartelmes), 192 p.,luksa bindo.
Infanoj de la Malriĉuloj (John A.Lee/Potts),272 p.
Juneca Ardo (Bartelmes), 120 p.
Kristanismo kaj patriotismo (Leo Tolstoj), 112 p.
Leteroj de L.L. Zamenhof (G. Varingien) en du volumoj, po 386 p.
Misisipi (Malaĥ), 64 p.
Nuna stato de l'Evoluismo (J.Rostand) 114 p.
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, 1344 p.
Plena Vortaro de Esperanto, 572 p.
La Revolucio de Ĉinio (H. Kobylinski), 92 p.
Ne plu ludo (Bartelmes), novelaro.

Skizo de Ekonomia Geografio (Ĥorrabin), 45 mapoj.
Skizo pri filozofio de homa digno (Gille/Lanti)
Tri Verkoj de Volter (Voltaire), trad. Lanti
Vojaĝo al Kazohinio (Szathmari), 318 p.
.....

Pri SAT kaj la laborista esperantismo:

For la Neŭtralismon! (Lanti)
La Laborista Esperantismo (Lanti),eld. de L.J.P.
Lanti pri Sennaciismo
Lanti pri Edukado , eld. de L.J.P.
Historio de SAT 1921-1952, 152 p.
Manifesto de Sennaciistoj (Lanti), 84 p.

## S.A.T. - servoj

Literatura Komitato de SAT:

La Literatura Komitato de SAT havas kiel taskon, laŭ lingvo kaj stilo kontroli la de SAT, LEA-oj aŭ eĉ privataj personoj publikigotajn verkojn.

Solidarservo de SAT

Filatelia Servo

Magnetofon-Servo

Radiofonio

Por ricevi informojn pri tiuj ĉi servoj, rilati kun SAT, Parizo.

## SAT-fakoj kaj frakcioj (vd. ekde p. 11!)

Kamaradoj, kiuj havas komunajn profesiajn aŭ amatorajn interesojn ariĝas en fakaj sekcioj, organe ligitaj kun SAT: Naturamikoj (TANEF), Liberpensuloj, Junulfako... kiuj rajtas aperigi siajn komunikojn en "Sennaciulo".

SAT-frakcio konsistas el SAT-anoj, adeptoj de sama politika partio aŭ tendenco. La tasko de la frakcioj, al kiuj SAT donas sian apogon, estas la propagando kaj aplikado de esperanto ĉe la respektivaj partioj aŭ tendencoj. Ekzistas ekzemple: Abundana Frakcio, Liberecana Frakcio, Pacista Frakcio, Sennaciista Frakcio ,Mondcivitana Fr...

# Esti membro de SAT...



Ĉar SAT praktike aplikadas esperanton, metode kaj persiste, ne atentante pri eventualaj oficialaj sukcesoj aŭ malsukcesoj en tiu aŭ alia lando aŭ ĉe tiu aŭ alia instanco.

Ĉar SAT ignoras la landlimojn kaj laŭdas nek naciajn instituciojn, nek internaciajn, se ĉi-lastaj maskas nur la konkuradon inter la diversaj nacioj, el kiuj ĉiu unuopa aspiras superi la aliajn.

Ĉar SAT estas malkaŝe socialismema, apogante sin senhezite kaj fide sur la konscia parto de la laboristaro tutmonda, sen distingo pri partia aŭ sindikata aparteneco. SAT ĉerpas sian membraron el la laborista klaso, sed ĝi akceptas kiel membrojn ankaŭ aliajn homojn, se tiuj agnoskas ĝian larĝe konceptitan Statuton kaj sin montras pretaj batali sur la kultura tereno por nova socia ordo de justeco kaj por unuigita homaro pensanta kaj aganta sennaciece, konsekvence pacisme, kontraŭmilite, kaj, sur la politika kampo, kontraŭ absolutismoj neakcepteblaj el vidpunkto de pensesprima libero.

Ĉar SAT estas unika provo de kleriga organizo mondskala por simplaj, proletklasaj homoj, per la helpo de lingvo universala kaj neŭtrala, ne permesanta avantaĝon al tiu aŭ alia lingva imperiismo.

Ĉar en SAT troviĝas gekamaradoj, kiuj eĉ havas la kuraĝon instrui esperanton al siaj propraj infanoj, ekde la unuaj jaroj de ilia vivo, pro la firma kaj bone pravigita konvinko, ke sennacieca lingvo malfermas al ili vastajn horizontojn kaj kondukas ilin en medion, kiu konsistigas la plej fruktodonan grundon por homa progreso kaj libero.

Venu do en niajn vicojn kaj helpu al ni konstrui ion tute novan ! Vi ne bedaŭros la tempon kaj energion elspezitajn por tiu ĉi socia klopodado.

<u>Informojn pri aliĝo donas:</u> S.A.T., 67, av. Gambetta
75020 Paris, Francio

aŭ via landa SAT-peranto.

# LEA-oj

Adresoj de Laboristaj Esperanto-Asocioj (LEA-oj) ligitaj al SAT per konvencio (la t.n. Gotenburga Konvenaio)kaj iliaj organoj.

Tiuj organizoj propagandas Esperanton en laboristaj medioj, sur siaj respektivaj teritorioj kun komuna lingvo.

SATEB (SAT en Britio): sekr. E. Prent, 29 Farrance Rd,
Chadwell Heath, Essex, RM6 6EB
Organo: "The Worker Esperantist"

DLEA (dana LEA): A. Bense, Sandbygaardsvej 34,
Kopenhago/Brh
Organo: "Nia Voĉo"

SAT-Amikaro (franclingva LEA): 67 av. Gambetta
75020 Paris
Organo: "SAT-Amikaro"

Libera Esperanto-Asocio (LEA por Germanlingvio):
kdo H. Pillekamp, Eisenstr.106
4 Düsseldorf
Organo:"La Libera Esperantisto"

F.L.E.(nederlanda LEA): Insulindeweg 158 III,
Amsterdam/O
Organo: "Komuna Gazeto"

SLEA (sveda LEA): Polgatan 84, Malmö SV
Organo: "Membro-Informilo"

J.E.L. (jugoslavia LEA): Terazije 42, Beograd.
Organo: "La Suda Stelo"

## LEA-Komitato

Inter la LEA-oj, subskribintaj la Gotenburgan Konvencion, ekzistas,en la kadro de SAT, LEA-Komitato, kies celo estas la propaganda laboro sur internacia tereno kaj interhelpo de LEA-oj.
Sekr: kdino J. Cignolo, 23 rue du 14 juillet
F 93310 Le Pré St Gervais

"La Juna Penso"

Kiel ligilon kaj esprimilon, junaj membroj de SAT, kunlabore kun diversaj afingrupoj, SAT-frakcioj kaj aliaj progresemaj tendencoj en Esperantio, eldonas la gazeton:

# La Juna Penso

**ĉar** LJP strebas utiligi la universalan lingvon Esperanto cele al senklasa, sennacieca mondsocio;

LJP celas faciligi la interrilatojn de siaj abonantoj por krei fortan senton de homeca solidaro;

LJP montras komprenemon kaj toleremon al la progresemaj skoloj aŭ sistemoj;

LJP celas per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado, helpi al plimultiĝo de libere pensantaj, sendogmaj homoj;

**tial** LJP estas verkata de la legantoj mem, kiuj sin esprimu libere kaj eventuale rebatu - kun toleremo - alies opinion. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas do la subskribintoj mem;

LJP bonvenigas ĉies kontribuojn kaj precipe tiujn pri aktualaj temoj sociaj, junularaj, ekonomiaj, ekologiaj, politikaj, edukaj kaj kulturaj. Neniu temo estas tabuo.

LJP dependas mone nur de siaj abonantoj. Povas aboni ĝin ĉiu ajn esperantisto, sendistinge de asocio, dank'al la reto de LJP-perantoj en diversaj mondpartoj;

**krome** LJP vi povas uzi kiel taŭgan materialon por interesaj diskutoj dum kunvenoj, aŭ kiel instruhelpilon por E-kursoj. Viaj kursanoj povas en ĝi aperigi siajn unuajn artikolojn;

LJP servas ankaŭ al izoluloj: ĉiu numero ligas ilin kun la tuta mondo;

LJP-abonantaro donace ricevas ĉiujare plurajn suplementojn, eldonitajn de la broŝurservo (vd.p.12!)

# Broŝur-Servo de LJP

adreso: La Juna Penso, F 47340 Laroque Timbaut
poŝtkonto: Bordeaux 3374 04 M, Francio

Suplemente al "La Juna Penso", la broŝurservo celas etkoste publikigi E-manuskriptojn (originaloj kaj tradukoj), reeldoni elĉerpitajn tekstojn, laùeble helpi per varbmaterialo. Ĉiu ajn E-fako, frakcio aù unuopulo povas uzi tiun servon. Klarigojn pri la eldonkondiĉoj peti de la ĉi-supra adreso. Ĉiu ajn povas mendi broŝurojn. Por grandkvantaj mendoj aù antaùmendoj oni ĝuas rabaton. Oni povas aboni aparte la broŝuran serion, sendante minimume 10 FF (aù 10 respondkuponojn) al la broŝurservo. Tiel oni ĝuas 20% da rabato kaj aùtomate ricevas la noveldonaĵojn ĝis elĉerpiĝo de la monprovizo. La broŝurservo plezure akceptas la sugestojn por venontaj eldonoj kaj helpon por tradukado, lingvokontrolado kaj mondonacoj. (Noto: la prezoj ĉiam inkludas la afrankon)

Disponeblaj broŝuroj

| | FF |
|---|---|
| Tri prelegoj pri "Gandhi kaj satjagraho" | 1,20 |
| La Tabuo (novelaro de J. Nesvadba) | 1,20 |
| Initiation à l'Espéranto(An Kaù),por francoj | 1,20 |
| La Laborista Esperantismo (E.Lanti) | 1. |
| Alveno de abundo kaj konsumsocio (P.V.Berthier) | 0,60 |
| En anarkista socio kiel kondutos la individuo(Grav) | 0,30 |
| La rentumo, kiun ni pagas (W.Schmid,tr.Bierhoff) | 0,30 |
| Ĉu neperforta revolucio aù revolucia liberiga milito? (T. Ebert) | 1. |
| Vivi en komunumo (M. Schneller) | 0,60 |
| Manlibro de nova homo (Rufegon) | 1. |
| La granda liberiĝo de l'homoj pere de scienco (J.Duboin) | 1,20 |
| Espéranto en 24 pages (por franclingvanoj) | 0,60 |
| Pri Edukado (el "Vortoj" de E. Lanti) | 1,50 |
| Eduko kaj vivsignifo + Rimarki (J. Krishnamurti) | 1,50 |
| Memvola Servuto (La Boesi, trad. kdo ROL) | 1,20 |
| Du rêve à la réalité (H. Masson), argumentaro por esperanto, en la franca | 1,50 |
| El leteroj de E. Lanti | 1,20 |
| Por la Paco, kontraù la Milito (citaĵoj el famuloj) | 1,20 |

| | |
|---|---|
| Prognozio (novelaro el la pola, trad. Madej) | FF 1,20 |
| Esperanto en 24 påginas (por hispanlingvanoj) | .. 0,60 |
| Nekombitaj pensoj (S.J.Lec, trad. Banacki) | .. 1,00 |
| Rido sanigas! (satira poemaro de Josef Burger) | .. 1,20 |
| La Liberecana Penso (citaĵoj) | .. 1,00 |
| Anarkio kaj organizo (E. Malatesta) | .. 1,00 |
| Absolutismo (prelego de E. Lanti) | .. 1,00 |
| Ne mortigu! (artikolo de Leo Tolstoj) | .. 0,30 |
| La Rajto de Pigro (Paŭlo Lafargue) | .. 1,50 |
| La Humanitaristaj Principoj (Eŭgeno Relgis) | .. 1,20 |
| La Parabolo pri la Cisterno (E. Bellamy) | .. 0,60 |
| Durruti, simbolo de la hispana revolucio (Pario) | .. 1,00 |
| La Piramido de l'Tiranismo (F.Domela Nieuwenhuis) | .. 1,20 |
| Paco en Proksima Oriento (Aharon Cohen,tr.Masson) | .. 1,20 |
| Civila Malobeemo (H.D.Thoreau, tr.McClafferty) | .. 1,20 |
| Komuna Kantareto | .. 0,60 |
| Informkajero pri SAT (LJP) | .. 0,60 |
| Kolekto da 28 bultenoj de Abundana Frakcio en SAT | .. 4,50 |

## Aliaj broŝuroj haveblaj ĉe la broŝurservo

| | |
|---|---|
| Liberigo de Timo (Bellamy-asocio) | .. 0,60 |
| Maŝinoj, mono kaj mondpaco (Socikredit-asocio) | .. 1,50 |

El la regularo de SAT-Junulfako:

1. Ni estas junulfako de SAT kaj adoptas la regulojn de tiu movado;
2. Nia ĉefa celo estas disvastigi la sennaciecajn konceptojn de SAT en junularaj medioj kaj organizi la junularan aktivecon en la kadro de SAT;
3. Povas esti ano de SAT-Junulfako ĉiu SAT-ano ne pli aĝa ol 35-jara;
4. La ligilo de JF estas la JF-Komitato, kiu konsistas el minimume tri membroj, elektitaj dum la jarkunsido de la JF....(...)
   JF-Komitato eldonas informilon, kiu aperas ĉiun duan monaton en la komuna bulteno ("La Juna Penso") sub la nomo "Vivo de la SAT-Junulfako".
5. La kotizo estas libervola ekde minimumo fiksata de la perantoj de JF en interkonsento kun JFK (aktuale 1/5 de SAT-kotizo, noto de la komp.)

.......

10. En ĉiu urbo kie eblas, ekzistu urba peranto aŭ urba komitato, elektita de la JF-anoj de la urbo. Li (ŝi) organizas la lokajn aktivecojn.

-------

Kunsidoj de SAT-Junulfako:

La jarkunsido de SAT-Junulfako okazas en la kadro de la SAT-kongreso.

Krom tiu dumkongresa kunsido, povas okazi ankaŭ aliaj JF-kunvenoj je aliaj datoj kaj lokoj. Tiuj kunvenoj povas servi por pridiskuti ĉiujn aspektojn de JF-aktiveco, sed ne havas decidrajton.

-------

Adreso:

Kdo Laurent Septier, 1 allée des Fougères
F 93340 Le Raincy , Francio

Poŝtkonto:

Laurent Septier, La Source 33 469 04,Francio

# SAT- frakcioj kaj afingrupoj

## Abundana Frakcio

Celoj: Propagandi esperanton en la movadoj pri abundo kaj distribua ekonomio; diskonigi per esperanto ties ekonomiajn tezojn (flugfolioj, artikoloj, verkoj); studi ekonomiajn problemojn...

Organo: "Por Sennacieca Ekonomio" (rubriko en LJP)

Krome eldonis: Kolekto da 28 bultenoj de A.F. FF 4,50

- Alveno de abundo kaj konsumsocio (P.V.Berthier) FF 0,60
- La granda liberiĝo de l'homoj pere de scienco (J. Duboin, kreinto de M.F.A) FF 1,00
- La Parabolo pri la Cisterno (Bellamy) FF 0,60

Krome liveras:

- La rentumo, kiun ni pagas (W.Schmid) FF 0,30
- Maŝinoj,mono kaj mondpaco (Socikredit-asocio) FF 1,50
- Liberigo de mizero (Bellamy-asocio) FF 0,60

Adreso: Kdo A. Naudé (Anode), 31 rue Folie l'Abbé
F 02400 Château-Thierry , Francio
Poŝtkonto: Paris 6475-48.

## Liberpensula Frakcio

Celoj: Aperigi en liberpensulaj revuoj artikolojn pri Esperanto; per praktiko komprenigi al lbp-medioj utilecon de tiu lingvo kaj samtempe instigi SAT-anojn al sendogmeca pensado.

Organo: rubriko en L.J.P.

Adreso: Kdo R. Durand, 3 groupe Ellen
F 88000 Epinal, Francio

## Liberecana Frakcio

Celoj: Propagandi kaj aplikadi Esperanton en la liberecanaj medioj; diskonigi anarkismon per esperanto.

Organo: "Liberecana Ligilo"

Krome eldonis: Pripensoj pri Anarkiismo(Fayolle) (L.L.)

- La Liberecana Penso FF 1,00
- Liberecanaj vivkonceptoj pri Soci-organizado (verkita de kdo Fontaura) FF 1,00
- La ŝtato masakras (pri Valpreda-afero) ~~(L.L.)~~
- La Anarkiistoj (S. Faure) (L.L.)

Krome liveras:

- La Liberecana Socio (Bastjan) FF 1,20

Adreso: Kdo Pelle Persson, Svartviksvägen 14
S 123 52 Farsta, Svedio

## Mondcivitana Frakcio

Celoj: Grupigas la SAT-anojn, kiuj sentas sin civitanoj de la tuta mondo kaj kiuj pretas subteni movadojn ĉiuspecajn, kies celoj estas: disvastigo de mondcivitana pensmaniero, agnosko de tutmonda civitaneco, starigo de tutmondaj institucioj.
MCF tiele difinas siajn taskojn:

a. propagando favore al Esp. kaj al SAT en la mondcivitanaj medioj;
b. diskonigo ĉe la SAT-anoj de mondcivitanaj movadoj, de iliaj celoj, principoj, agadoj kaj atingaĵoj;
c. diskonigo ĉe mondcivitanaj medioj de la sennaciecaj ideoj;
ĉ. partopreno, ĉu kolektive, ĉu individue, en la diversaj movadoj, kiuj favoras la tutmondan civitanecon kaj ne kontraŭas la statuton de SAT.

Organo: rubriko en L.J.P.

Adreso: Kdo Lhéritier, 10 impasse de la Loi
F 75020 Paris, Francio

Disponebla broŝuro: "Kongreso de la Popoloj" FF 2,00

## Pacista Frakcio

Celoj: Studi, malkovri kaj disfamigi la kialojn de milito, esplori la rimedojn kontraŭajn kaj utiligi ilin por kiel eblé plej faciligi la kontraŭmilitan taskon en la kadro de SAT;
Meti esperanton je la servo de la pacistaj organizoj neesperantistaj por tiel helpi ilin;
Disvastigi esperanton en la pacaj medioj;
Instigi la anojn al agado per ties klerigado...

Organo: "Por la Paco" (rubriko en L.J.P.)

Krome eldonis:

- Ĉu neperforta revolucio aŭ revolucia liberiga milito? (T. Ebert) FF 1,00
- Por la Paco, kontraŭ la Milito (citaĵoj) FF 1,20

Adreso: Kdo R. Schneller, 3 av. de Rosemont
CH 1208 Genève, Svisio
Poŝtkonto: 12-20143

## Naturamikoj (T.A.N.E.F)

Organo: "La Migranto"

Adreso: Kdo C. Bruins, Wilhelminapark 24
NL Oegstgeest 2407, Nederlando

## Sennaciista Frakcio

Organo: "Sennaciista Bulteno" (apero aktuale interrompita)

Adreso: Kdo A. Caubel, 157 rue Pressoir-Tonneau
F 45160 Olivet, Francio

Broŝuro: "Manifesto de la Sennaciistoj kaj Dokumentoj pri Sennaciismo" (E. Lanti)

Pro la graveco de tiu dokumento, kiu entenas la kvintesencon de la pensoj de E. Lanti, la fondinto de SAT, jen kelkaj ekstraktoj el tiu broŝuro

Ekstraktoj el

# Manifesto de la Sennaciistoj

Sennaciismo estas ismo, laŭ kiu ne ekzistus nacioj kaj sekve ĉiuj homoj sur la tero estus samregnanoj, mondcivitanoj.

...

Nacio, aparato farita el potencavido, ĵaluzo, malamo kaj stulto, kiun uzas suvereno, diktatoro, partio aŭ klaso, por akiri famon, honorojn, bonstaton ktp. je la malprofito de l'grandega plimulto de la aparateroj, t.e. la simplaj nacianoj. Memkompreneble aparato utilas nur al ties uzantoj, t.e. la registoj.

...

Sennaciisto - Homo, kiu aprobas kaj propagandas sennaciismon, kaj absolute ne taŭgas kiel materialo por fabriki aparaton nacian.

...

Sennaciulo - Homo, kiu ne nur aprobas sennaciismon, sed plie sukcesis senigi sin je prefero por lando, kie ĝi naskiĝis kaj kies civitano jure kaj devige ĝi estas.

..............

La sennaciistoj prezentas do al si la teron kiel unuon, kiel tuton, apartenantan al ĉiuj teranoj. Se en iu regiono ekzistas krudaĵoj, neutiligataj de la tieuloj, ni opinias, ke ĉi tiuj lastaj ne rajtas malhelpi, ke alieuloj utiligu tiujn naturajn riĉaĵojn.

...

Kompreneble ni malaprobas k kontraŭbatalas la malindajn procedojn, aplikatajn de la kapitalisma imperiismo en la kolonioj, tial ke fakte ili ne celas civilizi, kulturi popolojn, kies socistato malfruas, sed nur ekspluatadi homojn k krudaĵojn je la profito de la burĝa klaso. Sed tio ne forigas la fakton, ke la neceso utiligi la naturajn riĉaĵojn el la tuta tero profite je ĉiuj teranoj postulas la malaperigon de suverenaj nacioj, kondukas al la forigo de rasaj apartaĵoj k al la submetiĝo de ĉiuj homoj je la direktoj de l'racio. Ni rigardas sekve reakcia la politikon, kiu konsistas en predikado pri sendependiĝo de nacioj,

pri memstareco de popoloj, pri konservo de moroj, kulturoj k lingvoj naciaj.

La sennaciistoj tamen ne kontraŭstaras al tiuj, kiuj sincere k sindone batalas por ke la nacioj akiru sian memstarecon, ili nur ne konsentas mem partopreni tian batalon, sciante tre bone, ke la nacia memstareco ne liberigas fakte la proletojn, ke ĝi povas nur profiti al la burĝa klaso; tial ke plie ili scias, ke en la nuna stadio de l'produktofortoj plena nacia memstareco eĉ ne eblas k sekve, ke ĝia akcelado estas utopia.

...

Sed estu nenia miskompreno : ni havas la firman konvinkon, ke nur la ekspluatata klaso, la proletaro, povas esti la historia forto, kiu starigos sennaciecan, seneksspluatan socion. Ne pro tio, ke la proletoj estas esence diferencaj de la burĝoj, sed tial ke ilia klasbatalo por emancipiĝi instigas ilin al mondskala unuiĝo, k samtempe devigas la ekspluatantojn senĉese perfektigi, pli raciigi la produktorimedojn.

...

Sed la sperto montras ĉiutage, ke la klasbatalo havas ŝancon sukcesi nur se ĝi estas organizata mondskale. La ĝisnuna internacia organizmaniero de l'proletoj ne plu estas la plej taŭga por konduki al sukceso la klasbatalon. Nur la sennaciismo proponas racian k trafan organizsistemon. Laŭ tiu sistemo la laboristoj ne estus nacie k internacie organizitaj, sed tutmonde laŭ industrioj.

...

Mondmastrumado preparas la grundon por mondkulturo, kulturo, kies substrato estu la racio.

Tio ne signifas, ke la homoj fariĝos ĉiuj sammodelaj. Kreiĝos certe ia unueco en la spiritostato k karaktero de l'homoj. Foriĝos la naciaj apartaĵoj, sed daŭre ekzistos individuaj diferencoj. Kaj tial ke la homoj havos la eblon kontakti kun ĉiuj mondpartoj, havos plurajn horojn liberajn ĉiutage k povos ilin dediĉi al persona laboro, al individua kulturo, oni povas prave konjekti, ke el tio rezultos fortaj individuoj kun originalaj pensoj k sentoj, kiuj esprimiĝos en diversaj artoj, kompreneblaj k senteblaj en la tuta mondo.

.........

Fermitan sekton, apartigitan de la cetera klasbatala la-

borista movado, la sennaciistoj ne celas formi. Ili nepre volas resti en intima kontakto kun ĝi. Partopreni ĝiajn batalojn, kiam ili fakte estas klasaj k sekve liberigaj. Tiom longe, kiom esperanto estos/praktikata de nur kelkaj dekmiloj - eĉ centmiloj - da homoj en la tuta mondo, la sennaciistoj ne pretendas formi partion, sed nur konsistigi tendencon en la laborista movado. Ili sekve povas eĉ aparteni partion en kiu estas permesite priparoli k defendi la novan ismon.

...

La sennaciistoj sekve vidas en la laborista esperanta movado la plej taŭgan grundon por dissemi siajn ideojn. Tial ili deziras ĝian unuecon, kiu estas kondiĉo por ĝia sukceso.

La sennaciistoj vokas al la laboristoj el la tuta mondo:

Lernu esperanton! Esperantistoj sennaciecigu!

La Sennaciista Frakcio
el membroj de Sennacieca Asocio Tutmonda

.......................................................................

<u>Noto de la kompilinto</u>: Multaj esperantistoj, tiel en la t.n. neŭtralaj medioj kiel en SAT, erare kredas kaj kredigas, ke sennaciismo estas la kvazaŭ oficiala doktrino de SAT, ke SAT estus "Sennac<u>iista</u> Asocio Tutmonda" !
Sennaciismo efektive estas nur unu el la diversaj tendencoj kunvivantaj en SAT. Lanti mem asertis:
"La sennaciistoj havas la konvinkon, ke la praktika aplikado de esperanto en organizo kiel SAT, kies strukturo estas sennacieca, estas tre taŭga grundo por dissemi la sennaciismon. Tial ili kontraŭus eĉ eventualan provon trudi oficiale al SAT sian propran ismon..." (Manifesto, p. 43)

★

Pliajn informojn oni povas peti rekte de SAT, Parizo
aŭ de via loka peranto por
- SAT
- LJP
- via **laborista** E-grupo

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

Gérant & imprimeur: Baudé, F 47340 Laroque Timbaut